

Bendeziroj

Kio portas min?

Estu benata

*en viaj demandoj kaj respondoj,
via timo kaj via sopiro.*

Estu benata

*kun ĉio, kion vi spertis,
kun ĉio, kio vin pregis,
kun ĉio, kio kaj kiu vi hodiaŭ estas,
ankaŭ kun ĉio,
kion la morgaŭo tenas preta por vi.*

Estu benata je ĉiu paŝo,

*je ĉio, kion vi agas aŭ lasas,
je ĉiu spiro –*

*kaj estu beno por ĉiuj,
kiuj renkontas vin.*

Amen

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Lidická 939/11,
CZ 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
☎ +420 723 672 335;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':

CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Kungsgatan 13B; SE-281 48 Hässleholm; Svedio
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_boarad@yahoo.se

Kontrollegis: Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio

✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

Enhavo

Dio konas nian karakteron	3
Pritrakto: Kiam morto kaj doloro ne plu ekzistos	5
Dek helpoj — pri la Dekalogo	6
Martin Buber	11
Ingegerd Olofsdotter aŭ S:ta Anna de Novgorod	13
Religio en Pollando	18
Ĉu Dio vere ekzistas?	20
Interretaj Diservoj en Esperanto	21
Listo de aliĝintoj al Kristana kongreso	22
Memore al Irén Bagi	23
Kanto: Ekdormu, Anĝelina	24

Redaktoraj vortoj

Kara leganto, jam multaj aliĝis al la Ĉi-jara kongreso, kiu okazos en Bjalistoko. Se vi ankoraŭ ne aliĝis, tuj faru tion. Vidu sur paĝo 22, kiujn malnovajn kaj novajn geamikojn vi renkontos tie.

Baldaŭ ni havos tre malgajan datrevenon — antaŭ unu jaro Rusio milite eniris la teritorion de Ukrainio. Preskaŭ ĉiu-tage oni raportas pri novaj eksplodoj kaj mortintoj. Krom la homaj perdoj, ankaŭ estas neimageble grandaj materialaj damaĝoj. Mankas al mi vortoj pri ĉio, kio okazas. Ni preĝu kaj helpu laŭeble.

Pro la situacio en Ukrainio, multaj programoj temas pri tiu lando. Hazarde mi aŭskultis programon pri S:ta Anna de Novgorod. Mi lernis, ke ŝi origine nomiĝis Ingegerd kaj estis filino de la unua sveda kristana reĝo, Olof Skötkonung. Interesa historio. Vi legu en la gazeto pri ŝi, kaj espereble vi trovas la historion interesa. Bonan legadon!

Dio konas nian karakteron

Prediko dum la kongreso en Domaszék, 17a julio 2022

Philippe COUSSON, FR

Karaj gefratoj, la teksto, kiun mi provos aktualigi por vi hodiaŭ, estas la ĉi-taga evangelia teksto, kaj de la katolika listo kaj de la listo de mia eklezio, unuiĝinta reformita kaj luterana.

Tiu peco el Luko venas post la rakonto de la parabolo de la “Bona Samariano”.

Responde al demando farita al Jesuo, kion fari por heredi eternan vivon, li renversis la aferon kaj demandis la homon, leĝiston kiu bone konis la leĝon, la Toraon. Tiu bone respondis per la duflanka resumo de la leĝo. Li denove demandis Jesuon, ĉifoje kiu estas mia proksimulo. Jen la parabolo kies konkludon diris Jesuo: faru tion saman.

Ni ne forgesu tiun diron de Jesuo, kiam ni alvenas al la hodiaŭa rakonto.

Li eniris en unu vilaĝon. Neniu nomo. Tamen, dank'al la evangelio laŭ Johano ni konas la nomon, Betania.



Philippe Cousson prelegas.
Fotis Oldřich Fischer

Poste la evangeliisto indikas: kaj virino, nomata Marta akceptis lin. Kvankam ofte tradukita, ankaŭ en Esperanto, la mencio pri la akcepto en ŝia domo ne troviĝas en la plej bonaj manuskriptoj, tamen oni povas supozi tiun akcepton. Oni ankaŭ konas la nomojn de kelkaj kiuj akceptis Jesuon en sia domo: Zakheo, Simon la fariseo, eble la sama kiel Simon la leprulo.

” 38 Kaj dum ili vojaĝis, li eniris en unu vilaĝon; kaj virino, nomata Marta, akceptis lin en sian domon. 39 Kaj ŝi havis fratinon, nomatan Maria, kaj ĉi tiu sidis apud la piedoj de la Sinjoro, kaj aŭskultis lian parolon. 40 Sed Marta estis distrata pro multo da servado; kaj ŝi alproksimiĝis, kaj diris: Sinjoro, ĉu vi ne zorgas pri tio, ke mia fratino lasis al mi servi sola? diru do al ŝi, ke ŝi min helpu. 41 Sed la Sinjoro respondis kaj diris al ŝi: Marta, Marta, vi zorgas kaj klopodadas pri multaj aferoj; 42 sed unu afero estas necesa; kaj Maria elektis la bonan parton, kiu ne estos prenita for de ŝi.

Luko 10, 38-42

Tiun nomon, Marta, Jesuo uzas dufoje kiam li respondas al ŝia peto. Ŝia nomo, aŭ kromnomo, signifas “sinjorino” aŭ “dommastrino”, kaj tiel ŝi agas.

Iu inter ni aludis al la akcepto de la “anĝeloj”. El tio oni komprenas ke akcepto de gasto estas devo.

La teksto daŭrigas tiel: Ŝi havis fratinon, vokitan Maria. La teksto uzas alian vorton, ne “nomata” sed “vokita”. La diferenco ne aperas en la Esperanta traduko. Tio ankaŭ portas indikon pri Maria. Ŝi estis vokita, ŝi ricevis alvokon. La nomo mem estas tre komuna, sed notinda estas la elekto de tiu verbo voki.

La rabeno, tiu kiu parolas, kiu instruas, kutime tiam sidis. Kaj la aŭskultantoj ankaŭ. Maria sidis antaŭ li, apud liaj piedoj, privilegia situacio. Oni povas tiam rimarki, ke en tiu tempo, ankaŭ la virinoj havis la eblecon aŭskulti la majstrojn, studi la leĝon, kleriĝi.

Marta sentis sian devon en la servado, kiel ŝajne ŝia nomo indikas. Sed la teksto estas pli tikla. Ŝi estis distrata pro multo da servado. De kio ŝi do estis distrata, se ne de la aŭskultado. Ŝia sento ke ŝia devo estis servado, kion ŝi certe volis tre bone fari kaj ke tiu servado estis grava, nepra. Sekve, ŝi ne komprenis la sintenon de sia fratino, kaj eĉ ne komprenis ke Jesuo ne rimarkis tion. Ŝi preskaŭ riproĉis la majstron pri tiu ne-rimarko.

Jesuo respondas al ŝi, uzante dufoje ŝian nomon, aldonante la zorgon kaj klopodon de Marta. Li indikas ke nur unu afero estas necesa. Alia variaĵo en la teksto diras ke eteta (greka oligos) afero estas necesa. Tamen, li ne indikas kio estas tiu necesa afero. Oni nur povas supozi.

Ebla respondo troviĝas en la Torao, en Readmono 8,3: *ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉio, kio eliras el la buŝo de la Eternulo, homo povas vivi.*

Jesuo krome diras ke Maria elektis la bonan parton. La teksto ankaŭ ne diras pri kio temas. La teksto same ne diras “pli bona” sed bona. La solvo eble estas ankaŭ en la antaŭa citaĵo.

Oni legas ke Marta konfesis: *Mi kredas ke vi estas la Kristo, la Filo de Dio, la venanta en la mondon.* Tio estas en Johano 11,27. Ŝi estas unu el la unuaj kiuj konfesas kredon, kaj ŝi estas virino. Marta ne estas nur tiu dommastrino kiu volas plejbone servi. Ŝi ankaŭ estas fidela disĉiplo.

Ŝia fido en Dio kaj en Jesuo, ŝia fideleco, estas same certaj kiel ĉi tiu de Maria. Ili estas du aspektoj, du flankoj de la fido en praktiko; religio de farado kaj religio de aŭskultado. Tamen la aŭskultado estas unua, cele al la proklamado kaj al la servado.

Maria, laŭ la tri aliaj evangelioj, dum iu manĝo, prenis vazon de pura narda ŝmiraĵo kiesodoro plenigis la domon, verŝis ĝin ĉu sur la kapo, ĉu sur la piedoj de Jesuo. Tiel ŝi anoncis, senkonscie, la morton de Jesuo. Ŝi estis kiel celebranto, pretigante la oferon. Ŝi ne nur aŭskultis, sed ankaŭ plenumis riton kaj tiel esprimis sian fidon.

Mi devas aldoni, ke simila epizodo, en Luko plej verŝajne rilatas al alia virino, kiu cetere same ne estas la alia Maria, Maria de Magdala. En la postaj bildoj, la artistoj miksis la tri, kaj erare reprezentis Marian de Magdala, ĉe la kruco, kun vazo de parfuma ŝmiraĵo apud ŝi.

Tiuj du personoj, la fratinoj de Betania, Marta kaj Maria, estas du figuroj de kredantoj, kaj ne estas hazardo ke ili estas ambaŭ virinoj. Ili estis amikoj de Jesuo apud ilia frato Lazaro. Fakte ĉiu kredanto estas kaj Marta kaj Maria, aŭskultanto kaj aganto, kredkonfesanto kaj celebranto. Sed ili ne estas nur modeloj, ili ankaŭ estas personoj, kun siaj karakteroj. Kaj tiujn karakterojn bone konas Jesuo.

Same Jesuo bone konas niajn karakterojn. Ni ne dubu pri tio. Ni do scii kio estas la bona parto, bona por ni mem, sed ankaŭ bona por la aliaj. Ni tute fidu al Kristo kaj al Dio kaj al la Spirito, ne

pensante ke per niaj zorgoj kaj klopodoj ni povas antaŭen puŝi la efektivigon de la Evangelio, de la Regno de Dio. Ni ankaŭ konfesu nian kredon kaj celebru la savagadon de Kristo.

Ĉiu kristano, ĉiu disĉiplo, havas sian propran karakteron, sian propran identecon, kiun bone konas nur Dio. La proklamata Evangelio rilatas al nia tuta propra personeco. Ĝi celas la renovigon, la revivigon, la relevigon de la tuta homo, de la tuta personeco por atingi la veran rilaton kun Dio, en fido kaj servo.

Amen.

Kiam morto kaj doloro ne plu ekzistos

Karaj,

Jen Biblia vorto en januaro 2023. En ĉi-mondo, ami alian personon samtempe implikas, ke iam ajn oni havos rompitan koron. La doloro estas grandega, kiam ni subite perdas amatan estaĵon el nia vivo. Ĉu ni senesperu pro tia malfeliĉa okazintaĵo? Finfine, la situacio ŝanĝiĝos; Dio mem vivos kune kun ni kaj la "unuaj aferoj" ne plu ekzistos. Kiel kredantoj, tio estas nia granda kaj konsoliga espero.

*Sincere,
Jerald*

*

Kaj mi aŭdis grandan voĉon el la trono, dirantan: Jen la tabernaklo de Dio estas kun la homoj, kaj Li loĝos kun ili, kaj ili estos Liaj popoloj, kaj Dio mem estos kun ili kaj estos ilia Dio; kaj Li forviŝos ĉiun larmon el iliaj okuloj; kaj la morto jam ne ekzistos; ne plu ekzistos funebro, nek plorado, nek doloro; la unuaj aferoj forpasis. Kaj diris la Sidanto sur la trono: Vidu, Mi faras ĉion nova. Kaj Li diris: Skribu, ĉar tiuj vortoj estas fidelaj kaj veraj.

(Apokalipso 21, 3-5)

Dek helpoj — pri la Dekalogo

Tria ordono — Ne uzu maldigne la nomon de Dio!

József FARKAS, hungara reformita pastoro

Serio de pritraktoj, tradukitaj de Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS, HU

Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio; ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon.

Eliro, 2a libro de Moseo 20,7

En mia infanaĝo mi lernis dum la preparado al konfirmacio, ke homoj plejparte per du manieroj pekas kontraŭ la tria ordono. Unuflanke per akraj blasfemoj, aliflanke per facilanimaj ĵuradoj.

Tiatempe plejparte ĉaristoj kaj soldatoj blasfemis, kiuj ĝenerale ne kutimis iri al preĝejo, do eblis tra la fenestro de la preĝejo montri eksteren: jen, ili pekas kontraŭ tiu ĉi ordono. La ĵurado estis la kutimo de ciganoj kaj judoj. “Ne plu mi vidu mian patrinon, se...” “Mi ĵuras al la vivo de mia infano, ke...” – tiuj estis la kutimaj formoj de iliaj ĵuroj. Ankaŭ ili ne venis al la preĝejo, do denove eblis fari la jam konatan kutimon, ke la bona kristana popolo konstatis, ke *ili* pekas kontraŭ la tria ordono, *ili* fuŝas la trian ordonon. “Mi dankas al Vi, mia Dio, ke mi ne estas tia, kiaj ili estas. Mi estas tie ĉi en la preĝejo kaj mi bele respektas Vin.”

En mia infanaĝo ĉirkaŭ tiel elformiĝis la pensado pri la Dekordono.

Verŝajne mi ne devas diri, ke hodiaŭ mi jam tute alimaniere pensas pri la tria ordono. Mi certas, ke tiu ĉi ordono direktiĝas al la preĝanta popolo, al la predikanta, konfesa, preĝeja popolo.

En la malnovaj tempoj la nomoj havis grandegan signifon. Hodiaŭ tion ni jam ne multe scias, ne multe komprenas. La nom-donado hodiaŭ estas estetika afero. La gepatroj, la baptogepatroj tiel elektadas inter la nomoj, ke per iu bela nomo oni donacu ilian infanon. En la malnovaj



Ágnes Ráczkevy-Eötvös dum prelego en Legnica. Fotis Bengt Olof Åradszon

tempoj oni ankoraŭ konjektis, oni ankoraŭ komprenis, ke la nomo signifas la esencon de io aŭ iu. Kiu posedas la nomon, tiu ankaŭ posedas iomete tion, kion aŭ kiun la nomo signas, signifas.

Ni rememoru pri kelkaj bibliaj datenoj! La historio pri la kreitado diras, ke Dio gvidis la bestojn antaŭ la homon, kaj la homo donis nomon al la bestoj. Per la praa, mistika esprimo tio signifas tion, ke la homo komencis regi unu post la alia la bestojn. Tiun potencon, tiun regadon signifis la nom-donado. Kiam la patro donis nomon al la infano, li metis en tiun ĉi nomon sian kredon, esperon, kaj se li havis, sian profetan vizion, kaj kiel sorton, metis la nomon sur la infanon. Mi aludas al la profeto Hoŝea, kiu per sia profeta maniero tiel elektis la nomon de siaj infanoj, ke la infano samtempe kunportis en sia nomo la sorton de Izrael, la mesaĝon de Dio.

Precipe grave estis la ekkono, la ekkompreno de la nomo de Dio. Ni pensu pri la sceno je la brulanta arbeto, kiam Dio alvokis Moseon kaj sendis lin, ke li elkunportu la sklavan popolon el Egiptujo. Moseo ŝatus scii la nomon de Dio. Ne nur pro tio, ke li havu konon pri Dio, sed ankaŭ pro tio, ke tra la nomo Dio estu iomete sub lia potenco. Per la nomo, tra la nomo li povu voki, elvoki Dion. Multe maltrankviligas Moseon la demando: kio estas Via nomo? Mi ne iras, ĝis kiam vi ne diros Vian nomon. Tie okazas la mirakla eldiro, ke Dio ion kaj diras kaj ne diras. Li tion respondas al Moseo: Tiel diru al la Izraelidoj: La Estanto sendis min al vi. Jahve: tiu ĉi kelk-litera, mistera hebrea vorto signifas

la noción de *esto*. Diru, ke la Esto, la vera Estanto sendis min al vi, kiuj estas nur kiel ombroj, kiel devenantoj. Li, la Memestanta sendas vin. “MI ESTAS, KIU ESTAS” – diras Dio. Dum jarcentoj la hebrea kaj kristanaj scienculoj esploras, kiel eblus ekkompreni la signifon de tiu ĉi mirakla dia sinprezento. Hodaŭ oni diras, ke eble tiel ni devus traduki: MI ESTAS, KIU ESTOS”. Kaj tio signifas, ke survoje, dumtempe vi ekkonos Min. Vi ekkonos min per tiuj multaj spertoj, kiujn vi travivos, dum vi iros kun Mi. Dio diras ion, sed Li ne estos sub la potenco de Moseo. Ekde tiam tiu ĉi sankta nomo gvidas judojn, kaj tiu ĉi nomo estas la granda trezoro de la juda popolo.

Ankaŭ la ŝanĝo de la nomo estas tre interesa. La Biblio rakontas multajn historiojn pri tio, ke iu ricevis de sia familio nomon kaj poste li ricevas novan nomon: mem Dio ŝanĝas lian nomon, aŭ aliaj cirkonstancoj kaŭzas la nomŝanĝon. Laŭ la malnova pensmaniero oni elprenas, elŝiras lin per la malnovaj fortoj, kaj metas lin sub la efikojn de novaj fortoj. Ni legas en la libro de Daniel, ke lin kaj liajn tri amikojn oni kunportas al Babilono kaj tie ili ricevas novajn nomojn. Oni volas ellevi ilin el la juda religio, for de ilia Dio, kaj transformi ilin al la efiko de la babilona spirito.

Same agis la kristanoj en la unuaj tempoj. Kiam ili ankoraŭ estis mem-konsciaj, ili donis novajn nomojn al la baptitaj homoj, anstataŭ la paganaj nomoj kristanajn nomojn. La filo de Augusteno ricevis la nomon Adeodatus, kiu signifas “donacita de Dio” – ankaŭ tiel ili volis

esprimi, ke ili volis elporti lin el la malnovaj, paganaj fort-reto al la efiko de kristanaj fortoj.

Do la nomo signifas potencon, forton. Kaj la eldiro de nomo vere signifis aperigon, movigadon. Ni pensu pri tio, kiam la apostoloj revenas post la unua misio, kaj per granda ĝojo diras al Jesuo “eĉ la demonoj submetiĝas al ni vianome” (Luko 10,17). La apostoloj eldiris, ke “en la nomo de la nazarea Jesuo” kaj torentis potenco el tiu ĉi nomo. La almozpetulon de la Bela pordo Petro kaj Johano tiel resanigas: “Arĝentaĵon nek oraĵon mi havas, sed kion mi havas, tion mi donas al vi: En la nomo de Jesuo Mesio la Nazareo: ekpaŝu!” Kaj la eldiro de la nomo de nazarea Jesuo signifis la alvokon de Jesuo. Petro kaj Johano eldiris la nomon, kaj la almozpetulo ekstaris kaj resaniĝis. Kaj kiam venis multaj homoj, la apostoloj konfesis, ke ne estis ilia degno, ne estis ilia forto kiu faris la miraklon, sed estis *la nomo*, kiun ili alvokis. “... ĉar sub la ĉielo ne estas alia nomo donita al la homoj, per kiu ni saviĝu” (Agoj, 4:12)

Nomo havas belegan teologion, kiun valorus esplori. Kiam mi profundigis en

la temon, mian koron plej multe varmigis tiuj versikloj el la Nombroj, el la kvara libro de Moseo, en la 6a ĉapitro (22-27) la beno de Aaron.

“Kaj la Eternulo ekparolis al Moseo, dirante: Diru al Aaron kaj al liaj filoj jene: Tiamaniere benu la Izraelidojn; diru al ili: La Eternulo lumu al vi per Sia vizaĝo kaj favorkoru vin; La Eternulo turnu Sian vizaĝon al vi kaj donu al vi pacon. Tiel ili metu Mian nomon sur la Izraelidojn, kaj Mi ilin benos.”

Kia simpla, kaj samtempe kia anima riĉeco estas malantaŭ tiu ĉi frazo: “Tiel ili metu Mian nomon sur la Izraelidojn, kaj Mi ilin benos.”

Mian nomon kiel *benon* vi metu sur viajn filojn.

Ni denove pensu pri tio, ke la nomo ne estas estetika fenomeno, nur sonoj, kiujn ni diras kaj okazas nenio. “Metu Mian nomon sur viajn filojn” signifas, ke Diajn benojn, la fortojn de Mia estado vi metu sur viajn filojn.

Ni rememoru pri la batalo inter Elija kaj la Baal-aj pastoroj! La Baal-aj pastoroj konstruas altaron kaj krias: “Baal! Baal! Montru kiu vi estas!” Sed vane ili krias, ĉar Baal estas malforta.

Tiam sekvas ilin Elija, ankaŭ li konstruas altaron kaj komencas preĝi: “Dio de Izrael! Tiu ĉi popolo forlasis vin, sed vi montru, ke Vi estas la Dio!” Elija vokas la helpon de la nomo de Dio, kaj falas fajro kaj Dio akceptas la oferdonon de Elija. Kriado de la nomo de Dio ne estas psika gesto, ke mi liberigu min, ke mi estu malŝarĝita, sed signifas veran movigadon en la spirita mondo, kiu havas ofte vere ŝanceligajn efikojn.



Elija kaj la profetoj de Baal

Se tion ni komencas kompreni, tiam estos vere konsterna la tria ordono: “Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio!” Ne misuzu ĝin!

La esenco de tiu ĉi ordono estas, ke timige granda forto estas en la nomo de Dio, do atentu, kiel vi uzas ĝin! Atentu, ke ne misuzu ĝin!

Ni alvenis al la esenca demando: kiu uzas malbone la nomon de Dio?

La plej granda kulpo, la kulpo de kulpoj laŭ la Biblio estas la perforto, la agreso. Tiu uzas malbone la nomon de Dio, kiu estas agresiva per la nomo de Dio. Eĉ la plej pie preĝanta homo uzas malice sian preĝon, se tio estas en la koro: “Dio, Viaj promesoj estas en mia mano, estu mia volo! Faru, Dio, kion mi petas!”

Sed pli agresive oni uzas la nomon de Dio, kiam iu volas regi alian homon per la nomo de Dio. Kiam oni bruligis homojn sur ŝtiparo, kiam la papo ekskomunikis Luther “in nomine Dei”: en la nomo de Dio. Tiuj estas la plej teruraj agadoj, ne la blasfemoj de ĉaristoj. Ne estas pli terura agado, kiam ĉefpastoro ekskomunikas iun, en kiu estas pli da Sankta Spirito, ol en la ĉefpastoro mem. Ĉu Dio rajtas lasi sen puno, kiam homo sian propran deziron por potenco volas sanktigi kaj kreditigi per la nomo de Dio?

Tie ĉi bedaŭrinde ni devas paroli pri tio, ke ankaŭ hodiaŭ eklezio servas al agreso. Estas tre malgaja fenomeno ankaŭ kaj ĝis hodiaŭ. La eklezio legitimas agreson en la nomo de Dio, kiam

benas armilojn, kiam preĝas pro la venko de armeo, kaj pro morto de multaj homoj de la kontraŭa nacio. Unu el miaj plej ŝokaj memoroj je la fino de la jaro 1944, ke aperis slipoj, paperetoj ĉie: “Ni estos la vipo de Kristo!” Kelkaj certe memoras pri tio. Tio rilatis pri judoj kaj pri ĉiuj, kiuj ne ŝatis la nazian ideologion. Tiuj estas teruraj misuzoj de la nomo de Dio.

Kiam eklezioj legitimis la mortigadon de judoj, “klarigis” ke judoj meritas tion, ĉar la juĝo de Dio estas sur ili – ĉu tio ne estis teruraj misuzoj de la nomo de Dio? Ĉi tio ĝis hodiaŭ hantas.

La rajton bruligi ŝtiparojn la eklezio jam perdis, sed daŭre la agresivaj potencoj de la mondo postulas, ke la eklezio jesu al iliaj volo.

Ne tro longe antaŭe mi aŭdis, ke – laŭdire – la fama evangelizisto, Billy Graham diris, ke ni devas defendi kristanismon, ni devas batali krucmiliton en Vietnamo, kaj li kolektas homojn al tiu ĉi batalo. Miaj gefratoj, estas terure, kiam kristana predikisto mortigadon, bombadon nomas krucmilito defendi kristanismon! Ĵus pri tio temas la tria ordono: ne malbonuzu la nomon de Dio! Maksimume tiu ĉi evangelizisto rajtus diri: “Nia kristanismo estas malforta kaj mi ne komprenas, kio okazas en nia mondo, ni ne havas eldiron de Dio”. La evangelizisto ne rajtas pri siaj propraj pensoj, pri sia propra filozofio diri, ke tio estas la vorto de Dio. Billy Graham povus diri, “Mi ne komprenas, kio estas en tiu

ĉi mondo” – kaj kredu al mi, tio estus la plej honesta kristana kredkonfeso, ke mi ne scias, kion faras Dio, mi ne scias, kion mi devas fari. Estus multe pli bona tion diri, ol tion, ke “Dio diras, ke vi ĵetu bombon sur ilin kaj mortigu ilin”. Multe pli bona estus, se kristanoj plorus kaj pentus, ĉar tio, kio okazas en la mondo superas niajn kapablojn, kaj ni ne havas profetojn, ni ne havas versiklojn; almenaŭ ni silentu kaj ploru, ni priploru tiujn, kiujn mortigas la bomboj.

Laŭ mia kredo Jesuo ellevas nin el la mondo de la malnova testamento, kaj diras al ni ion pli, ol la dekalogo.

Kial vi ne misuzu, malbonuzu la nomon de Dio? La malnovtestamenta klarigo estas: “...ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon”. Judoj eĉ ne diris la nomon de Dio, Jahve. Ili ĉirkaŭskribis ĝin. La malnovtestamenta etoso estas la timo. Jesuo gvidis nin al io multe pli bona. Unue Li donis al ni la novan nomon de Dio. Tiun ĉi belegan, simplan nomon, tiun unikan fenomenon en la historio de religioj, ke la nomo de Dio estas Abba, mia patro, mia paĉjo. Jesuo instruis nin, ke ni tiel nomu Dion: mia bona patro! Li

proksimen kunportis al ni Dion kiel patron, ke en la etoso de fido tiel ni nomu Lin.

Jesuo diras la saman: ne uzu ofte la nomon de Dio. Kiam vi preĝas, vi eniru en vian internan ĉambron. Jesuo tenas, konservas la esencon, ke vi ne ofte menciadu Dion, sed ne pro tiu kaŭzo, ke alie Dio punos vin. La komunumo de Dio estas mirakla afero, tion vi ne ŝanĝu al milita ilo. Jesuo tion diras, ke Dio estas via bona patro, ne vundu Lin per tio, ke vi vane, ofte, senenhave menciadas Lian nomon. Estu sankta via rilato kun Li, kaj se vi vane, ofte, senenhave menciadas Lian nomon, tiel vi malplenigas, nuligas vian kontakton kun Dio.

Pri tiu sceno, kiam Moseo ĉe la brulanta arbeto ricevas la vorton de Dio, Martin Buber (*1878 en Vieno; †1965 en Jerusalemo), la plej granda juda biblia-scienculo kaj filozofo diris: La signifo de tiu ĉi eldiro laŭ mi estas, ke “Mi estas tie ĉi”. Preskaŭ tion li diris: “Vi ne devas voki Min, vi ne devas nomi Min, mi estas tie ĉi”. Laŭ Martin Buber tio estas la memeldiro de Dio. “Mia nomo estas, ke Mi estas tie ĉi. Ĉiam Mi estas tie ĉi, kun vi.” Dio donis tiun ĉi memeldiron,

23a Psalmo

La Eternulo estas mia paŝtisto; mi mankon ne havos. Sur verdaj herbejoj Li ripozigas min, apud trankvilaj akvoj Li kondukas min. Li kvietigas mian animon; Li kondukas min laŭ vojo de la vero, Pro Sia nomo. Eĉ kiam mi iros tra valo de densa mallumo, mi ne timos malbonon, ĉar Vi estas kun mi; Via bastono kaj apogiĝilo trankviligos min.

Vi kovras por mi tablon antaŭ miaj malamikoj; Vi ŝmiris per oleo mian kapon, mia pokalo estas plenigita. Nur bono kaj favoro sekvos min en la daŭro de mia tuta vivo; kaj mi restos en la domo de la Eternulo eterne.

ke ni ne devas voki Lin. Eble tio estas la plej profunda signifo de tiuj ĉi vortoj. Ne nomu, ne voku tiel ofte Dion, ĉar per tio vi montras vian ne-fidon al Li.

En la 23a Psalmo tiel belege eksonas tiu ĉi penso:

“La Eternulo estas mia paŝtisto; mi mankon ne havos. Sur verdaj herbejoj Li ripozigas min, apud trankvilaj akvoj Li kondukas min. Li kvietigas mian animon; Li kondukas min laŭ vojo de la vero, pro Sia nomo.”

Ne pro mia preĝo – sed pro Lia nomo. Ĉar Li estas tie ĉi, ĉar Li estas mia patro, mia pastoro. Pro Lia nomo.

Tio ne signifas, ke ni devas fini preĝi, sed signifas, ke nia preĝo estu laŭdo al Dio kaj danko, ke Vi estas tie ĉi, mia Dio.

Nia preĝo estu respondo: Mia Sinjoro, mi rimarkis, ke vi estas kun mi, mi fidas en Vi, mi metas mian aferon sur Vin.

Eblas bone uzi la nomon de Dio, nur tion ankoraŭ devas lerni, kaj plejparte la popolo de Dio devas lerni tion.

— Rimarko:

Antaŭaj artikoloj pri la dekalogo troviĝas en la jenaj numeroj de Dia Regno:

1/2022: enkonduko

2/2022: 1a ordono


3/2022: 2a ordono

Martin BUBER

Ĉerpo el Vikipedio

Martin BUBER (*1878 en Vieno; †1965 en Jerusalemo) estis aŭstra-israela juda filozofo, vivinta krom en tiuj du landoj ankaŭ en la Rusia Imperio, Svislando kaj en la Germana Regno.

Li estis filo de la finance bonstataj vienanoj. Post la disiĝo de la gepatra paro en 1881 li ekde la aĝo de 4 jaroj kreskis ĉe la geavoj en la urbo Lvivo, germanlingve nomata Lemberg (nuntempe en Ukrainio). Lia avo estis la juda klerulo Salomon Buber, kiu tiutempo estis inter la plej gravaj esplorantoj pri la ĥasidisma tradicio de orienteŭropa judismo.



Martin Buber, public domain /
Wikimedia komunejo

Post la pola gimnazio en Lvivo Martin Buber studis en Vieno, Lepsiko, Zuriko kaj Berlino. Inter liaj fakoj estis kursoj pri filozofio, germanistiko, arta historio, psikiatrio kaj psikologio.

En 1899 li edziĝis kun la katolikino Paula Winkler, kiu intense partoprenis lian laboron kaj je la (vira) pseŭdonimo Georg Munk mem verkis.

En Vieno Martin Buber persone konatiĝis kun Theodor Herzl, kaj li aliĝis al ties movado de Cionismo. Ekde la jaro 1905 li laboris kiel literatura eldonisto por la eldonejo Rütten & Loening, kie li iniciatis kaj prizorgis la grandan projekton de “soci-psikologia” libroserio nomata LA SOCIO.

Inter la jaroj 1924 kaj 1933 Martin Buber estis docento kaj honoraria profesoro pri judismo en la universitato de Frankfurto ĉe Majno. Post la ekrego de la nazioj li rezignis pri la profesoreco. En 1935 li kadre de la naziaj leĝoj estis malmembrigita el la verkista asocio de Germanio.

En 1938 li sukcesis fuĝi el Nazia Germanio al Jerusalemo kaj ĝis la jaro 1951 li instruis antropologion kaj sociajn sciencojn en la hebrea universitato de Jerusalemo.

Verkaro

Kvankam li mem ne membris en iu ajn el la branĉoj de judismo, Martin Buber en sia verkaro aparte fokusigis la komprenon de la ortodoksa kaj ortodoksega mistika juda movado de orienta Eŭropo fare de homoj de la okcidentaj industriigitaj socioj. Tiucele li tradukis multajn rakontojn kaj tradiciojn de la ĥasidismo en la germanan lingvon.

Dum sia tuta vivo Martin Buber estis peranto inter la minacata tradicia juda mondo en orienta Eŭropo kaj la (juda, kristana kaj ateista) okcidenta mondo de klerismo kaj natursciencoj. Jam en la komenca fazo de la cionisma movado li insiste pledis por peno de ĉiuj judoj peni pri laŭeble bonaj rilatoj al la araboj. Tio inter aliaj judoj rezultigis al li multajn protestojn kaj malamikecojn.

Laŭ instigo de la eldonisto Lambert Schneider Martin Buber en 1925 kun la frankfurta juda filozofo Franz Rosenzweig komencis retraduki la Tanaĥon, parto ankaŭ de la kristana Malnova Testamento, de la hebrea al la germana lingvo. La du kleruloj aparte celis lingve ekzaktan tradukon, respekte de la hebrea originalo, kaj konservon de la plena signifa riĉo.

La traduko de Buber kaj Rosenzweig kun la traduko de la Torao fare de Moses Mendelssohn konsideriĝas la plej signifa kaj plej ekzakta germanlingva eldono de la juda Biblio.

En siaj filozofiaj verkaĵoj Martin Buber aparte temigas la dialogon kiel antropologia homa principo. Lia ĉefa verkaĵo havas la titolon MI KAJ CI kaj temigas la rilaton de la homa individuo al Dio kaj al aliaj homoj kiel ekzisteca, dialoga kaj religia principaro. Tiu verkaĵo influis multajn postajn germanlingvajn klerulojn. Krome Martin Buber en tekstoj kiel TRI FRAZOJ DE RELIGIA SOCIALISTO pledis por religia socialismo.

☞

Ingegerd Olofsdotter aŭ S:ta Anna de Novgorod

Granddukino de Kievo, monaĥino kaj unua sanktulino de Svedio

Adaptita kaj tradukita de Bengt Olof ÅRADSSON, Svedio

Ingegerd, filino de la unua kristana sveda reĝo Olof Skötkonung, kreskis en Sigtuna, iĝis rusa granddukino kaj, post sia morto, iĝis ortodoksa sanktulino.

La 10an de februaro 1050 mortis la monaĥino Anna en Novgorod, en nuntempa Rusio. Anna, en siaj 50aj jaroj, eniris monaĥejon nur kelkajn jarojn antaŭ sia morto.

Sub la mantelo de la monaĥino kaŝiĝis Granddukino Irina, la plej potenca virino de Kieva Rusio (vidu mapon sur paĝo 21). Ŝia vera nomo estis Ingegerd kaj ŝi estis la filino de la reĝo Olof Skötkonung en Sigtuna, Svedio.

Ingegerd naskiĝis ĉirkaŭ la jaro 1000. Ne estas certe kie ŝi naskiĝis. La reĝo kaj lia familio multe moviĝis. Sed, ĉar en Sigtuna la reĝo Olof komencis la monfaradon en 995, la unua en Svedio, estas verŝajne ke li foje pritraktis politikon kaj administradon el sia tiea urba reĝa bieno kaj do eblas ke Ingegerd tie naskiĝis.

Dum la vikinga epoko, okazis tre ofte ke reĝaj infanoj estis senditaj al parencoj por esti kreskigita.

La patrino de Ingegerd estis filino de slava princo nomita Estrid, kaj la frato de Ingegerd, Jakob, kreskis ĉe la familio de ŝia patrino sur la suda balta marbordo. Kaj la fratino Astrid ĉe aliaj parencoj.

Sed Ingegerd estis edukita en la gepatra hejmo, kiu do – almenaŭ provizore – troviĝis en Sigtuna.

Pri ŝia edukado oni scias nenion, sed pastroj kaj misiistoj, kiuj restis ĉe la reĝo, certe instruis al ŝi la kristanan doktrinion.

Reĝo Olof estis kolerema persono kaj ankaŭ lia edzino, laŭ la islanda kronikisto



Ikono en Eskilstuna ortodoksa paroĥo.

Snorre Sturlasson. Alivorte, eble foje estis “hejtigita” aŭ “pasiigita” la aero en la reĝa kortego. Ingegerd, kiu certe estis tre bela knabino, ŝajnas esti la okuljuvelo de Olof. Almenaŭ ŝi ne timis diri tion, kion ŝi pensis, eĉ se tio estis kontraŭ la opinio de ŝia patro.

Por la reĝoj de la vikinga epoko, ke geedziĝoj estu politike avantaĝaj estis same grave kiel ilia sukceso en milito. Ingegerd, kiam estis tempo por ke ŝi edziniĝu, iĝis parto en ĉi tiu ludo. Unue, la juna reĝo de Norvegio, Olav Haraldsson, estis proponita al ŝi. La svatado kolerigis Olof Skötkonung, ĉar li kaj la norvega reĝo (la estonta Olav la Sanktulo) estis amaraj malamikoj. La propono estis samtempe paciniciato, sed reĝo Olof Skötkonung ne volis aŭdi pri iu repaciĝo kun Olav, kvankam varme Ingegerd parolis favore al la geedziĝaj planoj.

Ne daŭris longe antaŭ ol aperis senditoj de nova svatanto. Estis Jaroslav I, kieva princo de Novgorod kaj nomita “la saĝulo”, kiu kontaktis lin.

La patro, kaj la ambasadoroj de Jaroslavo, akceptis. Ingegerd ankoraŭ ne estis 20-jara, kiam ŝi edziniĝis.

Ŝajnas, ke ŝi sufiĉe bone fartis, tie en la lando *Rus* (ne miksu kun la nuna Rusio); la lando estis kristana kaj havis viglajn ligojn kaj kun la nordiaj landoj kaj kun la resto de Eŭropo. Agrikulturo, metio kaj komerco estis en periodo de prospero, troviĝis pluraj grandaj urboj kaj Kievo estis la ĉefa sidejo.

Kun sia forta volo kaj sia “nazo por potencludo”, ŝi aperas en la historiaj fontoj kiel grava konsilisto al sia edzo,

kio estis proksimume 25 jarojn pli maljuna. Eĉ en pluraj historiaj fontoj, ŝi aperas kiel la dominanta el la du. Laŭ islanda fonto, ŝi sukcesis, ekzemple, unufoje fari pacon inter Jaroslav kaj unu el liaj fratoj, ĝuste kiam iliaj armeoj ekmarŝis unu kontraŭ la alia.

Farante tion, ŝi ankaŭ donis kialon por sia nova nomo Irina, kiu signifas “paco”.

Ĝis la jaro 1035, Jaroslav sukcesis venki kaj forigi per diversaj manovroj ĉiujn aliajn defiantojn por potenco en Kieva Rus, kaj li kaj Ingegerd povis moviĝi al la ĉefurbo, Kievo.

La grandduko konstruis tute novan distrikton, ĉirkaŭita de pluraj kilometroj longa, dek unu metrojn alta remparo kun tri pordegoj: la plej distingita estis nomita



Kieva regno en 1054.

Far SeikoEn - Propra verko, CC BY-SA 3.0 / Vikipedio

Ora Pordego. Estis la urbo Konstantinopolo, kiu estis la modelo kaj Jaroslav malfermis Kievon kaj la reston de la lando al grekaj pastroj, arkitektoj, artistoj kaj metiistoj.

La katedralo de Sankta Sofia ankoraŭ staras kaj estas la monumento plej grava en Kievo el tiu ĉi epoko. Ĝi estas dominata per la oraj cepaj kupoloj. En la stukaĵo sur la muroj de la preĝejo oni ankoraŭ povas distingi kelkajn el la pentraĵoj, kiuj estis faritaj kiam la konstruaĵo estis nova. Inter ili estas ankaŭ bildoj de la infanoj de la princa familio. Jaroslav kaj Ingegerd ankaŭ estis pentritaj en la preĝejo, sed tiuj bildoj bedaŭrinde malaperis. La muro, kie troviĝis tiuj pentraĵoj, estis disfaligita en la 17a jc.

Sep filoj kaj tri filinoj estas konataj de la geedziĝo de Jaroslav kaj Ingegerd. El la filinoj, unu, Elisabet, estis edzinigita al eble la plej granda norvega vikingo, Harald Hardrada (la kromnomo Hardrada signifas “severa konsilanto” aŭ “severa reganto”), maljuna bofrato de Jaroslav. Dua filino, Anastazio, geedziĝis kun la estonta reĝo Andreas de Hungario. La tria filino, Anna, geedziĝis kun Henriko I de



Fresko en la Sofia-katedralo, kiu montras kelkajn el la infanoj de Ingegerd kaj Jaroslav. 11a jc. / Vikipedio

Francio, unu el la unuaj en la tielnomita kapetida dinastio.

Kiam Anna venis de Kievo al Francio, ŝi kaŭzis sensacion pro sia edukado, ĉar ŝi scipovis legi kaj skribi, kion la aliaj virinoj en la franca kortego ne povis. Posteuloj de la kapetidoj daŭre regas en Eŭropo. Reĝo Juan Carlos de Hispanio estas unu el la malfruaj posteuloj de Ingegerd same kiel Grand-duko Jean de Bourbon-Parma, nuna reganto de Luksemburgio kaj Otto von Habsburg.

La geedziĝo de Ingegerd al Jaroslav daŭris 30 jarojn. Sed ŝi neniam forgesis sian infanan amaton, la norvegon Olav Haraldsson. Kiam la estonta norvega nacia sanktulo estis devigita fuĝi de sia patrujo en 1028, li trovis rifuĝon en Novgorod. Tiam li ankaŭ renkontis Ingegerd. “Ŝi kaj Olav amis unu la alian sekrete,” se oni kredas islandan fonton, la sagao de Emund.

Ingegerd ankaŭ akceptis Magnus, kiu estis la filo de Olav, kiel vartifanon, ĉar kiam Olav revenis al Norvegio – li mortis ĉe la batalo de Stiklestad – la knabo restis kun Ingegerd. Fine, ankaŭ Magnus Olavsson (“la bona”) iĝis reĝo de Norvegio.

Laŭ ortodoksaj fontoj Ingegerd dediĉis sin intense al la eklezio kaj religia vivo. Ŝi fondis monaĥinejon kaj, je la fino de sia vivo, sin ordinis kiel monaĥino laŭ la plej strikta ordo kaj tiam estis nomita Anna. “Ŝi per tio montris sian profundan piecon kaj sian veran kristanan humilecon”.

Rusa fonto de la 19a jc. deklaras: “Anna (Ingegerd) estis la unua ekzemplo de grandiozaj dukaj personoj sanktigataj

per enirado de monaĥejo. Tiu kutimo, prenita de grekaj regantoj, komenciĝis en Rusio en la 11a jc. kaj daŭris senĉese preskaŭ ĝis la 17a jc.”

La restaĵoj de Ingegerd ripozas kune kun tiu de ŝia edzo en sarkofago en la katedralo Sankta Sofia en Kievo. Ĝi estas masiva, preskaŭ du metrojn kaj duono granda peco de griza marmoro. Sovetiaj sciencistoj malfermis la sarkofagon en 1939 kaj ekzamenis la enhavon. La bone konservita kranio de Ingegerd estis de la nordia tipo, masiva kaj peza kun elipsa formo.

Ingegerd estas festata laŭ la rusa eklezia kalendaro kiel sanktulo la 10an de februaro kaj la 4an de oktobro. La 10a de februaro estas ŝia propra mortodatreveno kaj la 4a de oktobro estas la mortodatreveno de ŝia filo Vladimiro. Vladimiro konstruigis la Hagian Sofian en Novgorod, pli malgranda versio de la Hagia Sofia en Kievo.

En la Mezepoko, la 4a de oktobro estis granda festotago en Novgorod kaj ĉiuj gvidaj ekleziaj eminentuloj estis devigitaj ĉeesti la mesojn. Caro Ivano mem (“la Terura”) dekretis en 1556 ke diservoj kaj ĝeneralaj rekviemoj devus esti aranĝitaj por Ingegerd kaj Vladimir “tiel longe kiel la mondo daŭras”.

Post la komunisma kolapso en Rusio, la eklezia vivo reviviĝis, same kiel la esploroj de la spiritaĵradikoj de la nacio. La sanktulo Ingegerd ankaŭ estis “remalkovrita”. Unu el la multaj pruvoj pri tio estas, ke en 1996 la Rusa Ŝtata Filminstituto faris filmon pri ŝia vivo.

Ingegerd de Sigtuna povas esti konsiderata esti la unua sanktulino de Svedio.

La kaŭzo ke Ingegerd ne iĝis enkanonigita sanktulo estas simple pro la fakto ke la bizanca eklezio ne aplikis la formon de kanonigo, sed la ortodoksa eklezio kanonigis ŝin en 1439. La relikvoj de Sankta Anna estis dividitaj, kio estas nekutime, inter Rusio, Ukrainio kaj Svedio.

Kiel spirita figuro, Ingegerd ankoraŭ vivas ne nur en Rusio kaj Ukrainio, sed ankaŭ en Svedio. En Eskilstuna ekde 1968 ekzistas sveda ortodoksa paroĥo kiu portas la nomon de Sankta Anna kaj kie Ingegerd estas honorata.

Kievo

Kievo, hodiaŭ la ĉefurbo Kyiv de Ukrainio, estis nomita *Könugård* fare de la nordanoj. La urbo aperis kiel regiona centro longe antaŭ la vikinga epoko. Elfosadrezultoj montras ke Kievo, aŭ antaŭulo de tiu grandurbo, ekzistis jam en la 6a jc., kaj kelkaj trovoj indikas ke ĝia deveno povas esti spurita plurajn jc. eĉ pli frue. Do, ne estis nordanoj kiuj fondis la urbon – sed post kiam la loko ekzistis, la nordanoj aktive kontribuis al ĝia florado, ĉar skandinavaĵoj militistoj kaj komercistoj establis sin en tiu loko kaj alianciĝis kun lokaj gravuloj, Kievo spertis glortempon de la fino de la 9a ĝis la fino de la 12a jc. La plimulto de la loĝantaro ĉiam estis orient-slava. La urbo iĝis la loĝejo de la granddukoj de *Kievrus*, kie grandsinjoroj kaj militistoj de ĉiuj nordiaj landoj refoje vojaĝis por serĉi helpon kontraŭ malamikoj aŭ por preni servon kiel militistoj.

Eĉ post kiam la reganta klaso en Kievo ŝanĝis paroladi en orientslava lingvo, kontaktoj estis proksimaj kun

regantaj familioj en la nordiaj landoj. La norvegaj reĝoj de la 11a jc. Olof Haraldsson kaj Harald Sigurdsson ambaŭ pasigis kelkajn jarojn en Kievo. Kaj kiel jam menciite, la sveda reĝo Olof Skötkonung edzinigis sian filinon al la grandduko Jaroslav.

La riĉa supera klaso en la grandurboj de *Gårdarike* (“Ĝardenlando” kiel la nordanoj nomis la areojn en la oriento) estis konata kiel *ruser*. La termino, kiu tute prave estigis la vortojn Rusujo kaj rusoj, estas inter la plej diskutataj en la malnova eŭropa historio. Laŭ tradicia sveda opinio, la esprimo atestas la originon de la homoj en centra Svedio, pli precize en *Roden* (nuntempe *Roslagen*). Forta subteno por la hipotezo estas ke la finna nomo por Svedio estas *Ruotsi* kaj la estona *Rootsi*. Laŭ tradicia rusa opinio, tamen, la vorto *rus* havas nenion komunan kun Svedio, sed estas pure orientslava termino.

Sendepende de kiu vidpunkto estas plej ĝusta, estas nedubeble, ke la hodiaŭaj lingvaj kaj etnaj disiĝoj ne apartenas al debato pri la 9a kaj 10a jc. En la tempo de *Könugård* ekzistis nek svedoj nek rusoj. Tiuj rusoj formis dominan eliton de militistoj kaj komercistoj kies etnaj kaj geografiaj originoj verŝajne estis tre diversaj. Ke multaj rusoj vere venis el la hodiaŭa Svedio povas esti konsiderata science pruvita, same kiel la orientslava popola elemento fariĝis ĉiam pli markita dum la fluo de la tempo.

Hagia Sofia

La nomo de la Sofiakatedralo en Kievo, estas prenita de la Hagia Sofia katedralo

[kio signifas “Dia Saĝeco”] en Konstantinopolo, nuntempa Istanbul. Ili estas dediĉataj al la Sankta Dia Saĝeco pli ol specifa sanktulino kun la nomo Sofia.

La fundamento estis metita en 1037 fare de grandduko Jaroslav I de Kievo kaj lia edzino, Ingegerd Olofsdotter. La katedralo longas 55 m kaj larĝas 37 m. Ĝi havas kvin navojn, kvin absidojn kaj, surprize por bizanca konstruaĵo, dek tri kupolojn. Duvicaj galerioj ĉirkaŭas la konstruaĵon sur tri el ĝiaj flankoj.

La ekstero estis origine kovrita per briko. Sian nunan aspekton, en la ukraina baroka stilo, la katedralo ricevis post rekonstruo, kiu komenciĝis fine de la 17a jc. kaj finiĝis en 1707. Interne, la preĝejo estas ornamita per bone konservitaj mozaikoj kaj freskoj de la 11a jc.

En 1934, la katedralo estis konfiskita fare de la sovetia ŝtato kaj transformita al arkitektura kaj historia muzeo, kune kun la ĉirkaŭaj monaĥaj konstruaĵoj de la 17a kaj 18a jc.

En 1990, la katedralo iĝis, kune kun la konstruaĵoj de la Monaĥejo Petherka, la unuaj objektoj de Ukrainio listigitaj en la Listo de Monda Heredaĵo de Unesko.

Postvortoj:

La historiaj fontoj pri la vivo de Ingegerd estas malmultaj kaj la informoj pri ŝia promocio al sankteco ne estas klaraj.

Fontoj

<http://historiska-personer.nu/min-s/paf200cd7.html>

<https://wadbring.com/historia/undersidor/anna.htm>

<https://heligaanna.nu/forsamlingens-helgon/>

https://sv.wikipedia.org/wiki/Ingegerd_Olofsdotter



Religio en Pollando

Ĉerpita kaj tradukita el angla Wikipedia de Bengt Olof ÅRADSSON

Pollando historie estis unu el la plej religiaj landoj en Eŭropo, kvankam enketoj trovis rapidan kaj akcelantan sekularigon. Oni trovis en 2018, ke inter tiuj sub la aĝo de 45, en Pollando okazis la plej rapida sekulariĝo inter 106 nacioj mezuritaj.

Kvankam multfacetaj religiaj komunumoj ekzistas en Pollando, la plej multaj poloj apartenas al kristanismo. Ene de tio, la plej granda grupiĝo estas la Romkatolika Eklezio: ĉirkaŭ 92% de la loĝantaro identigis sin kun tiu konfeso en 2018 kaj, laŭ la Instituto por Katolika Eklezia Statistiko, 7% de polaj katolikaj kredantoj ĉeestis dimanĉan meson en 2015. Pollando historie estis unu el la plej katolikaj landoj en la mondo.

Romkatolikismo daŭre estas grava en la vivo de multaj poloj, kaj la Romkatolika Eklezio en Pollando ĝuas socian prestiĝon kaj politikan influon. Ĝiaj membroj rigardas ĝin kiel deponejon de pola heredaĵo kaj kulturo. Pollando pretendas havi la plej altan proporcion de katolikaj civitanoj de iu lando en Eŭropo krom Malto kaj San-Marino (pli alte ol en Italio, Hispanio, kaj Irlando, ĉiuj landoj en kiuj la Romkatolika Eklezio estis la sola establita religio).

La nuna amplekso de tiu nombra domineco rezultas plejparte de la Holokaŭsto, same kiel la fuĝo kaj elpelo de germanoj, multaj el kiuj ne estis katolikoj,

ĉe la fino de 2-a Mondmilito.

La resto de la loĝantaro konsistas plejparte el orienta ortodoksa (Pola Ortodoksa Eklezio – proksimume duonmiliono da kredantoj), diversaj protestantaj eklezioj (la plej granda el tiuj estas la Evangelia eklezio de la aŭgsburga konfeso en Pollando, kun ĉirkaŭ 60 mil membroj) kaj Atestantoj de Jehovo (110 mil). Troviĝas ĉirkaŭ 55 000 grekaj katolikoj en Pollando. Aliaj religioj praktikataj en Pollando, je malpli ol 0,1% de la loĝantaro, inkludas islamon, judismon, hinduismon kaj budhismo.

Laŭ statistiko, kolektita en 2018, 3,1% ne apartenas al iu religio. En 2015, pli ol 60% de la loĝantaro donis al la religio altan ĝis tre altan gravecon. Kontraŭe ĉirkaŭ 14% atribuis al la religio malgrandan aŭ neniun gravecon.

La proporcio de kredantoj estas multe pli alta en la orientaj partoj de Pollando.

Historie

De la komenco de ĝia ŝtatiĝo, malsamaj religioj kunekzistis en Pollando. Kun la komenciĝo de la tiel nomata “Bapto de Pollando” en 966, la malnovaj paganaj religioj estis iom post iom ekstermitaj dum la sekvaj kelkaj jarcentoj dum la kristanigo de Pollando.

Tamen, tio ne ĉesigis paganajn kredojn en la lando. La persisto estis montrita per serio de ribeloj konataj kiel

la Pagana reago en la unua duono de la 11a jarcento, kiu ankaŭ montris elementojn de kamparanribelo kontraŭ terposedantoj kaj feŭdismo, kaj kaŭzis ribelon, kiu malstabiligis la landon.

Ekde la 13a jarcento katolikismo fariĝis la dominanta religio ĉie en la lando. Tamen, kristanaj poloj kunekzistis kun signifa juda segmento de la popolo.

En la 15a jarcento, la Husanaj Militoj kaj la premo de la papofico kondukis al religiaj streĉitecoj inter katolikoj kaj la kreskanta husanaro kaj posta protestanta komunumo. La protestanta movado akiris grandan nombron da sekvuloj en Pollando kaj, kvankam Rom-katolikismo retenis dominantan pozicion ene de la ŝtato, la liberala Varsovia Konfederacio en 1573 garantiis larĝan religian toleremon. Sed la reakcia movado sukcesis redukti la amplekson de toleremo fine de la 17a kaj frua 18a jarcento – kiel pravas eventoj kiel la Tumulto de Toruń (1724).

Kiam Pollando estis disigita inter siaj najbaroj en la malfrua dekoka jarcento, kelkaj poloj estis submetitaj al religia diskriminacio en la vastigita germana Prusio kaj Rusio.

Antaŭ la Dua Mondmilito, proksimume 3,5 milionoj polaj judoj (proksimume 10% de la nacia loĝantaro) vivis en la Pola Dua Respubliko, plejparte en grandurboj. Inter la german-sovetiaj invadoj de Pollando kaj la fino de Dua Mondmilito, pli ol 90% de judoj en Pollando pereis. La holokaŭsto (nomita la *Shoah* en la hebrea) prenis la vivojn de pli ol tri milionoj da judoj en Pollando. Kompare malmultaj sukcesis postvivi la germanan okupon aŭ eskapi orienten en

la teritoriojn de Pollando, kiuj estis aneksitaj fare de Sovetunio.

Kiel aliloke en Eŭropo, dum la intermilita periodo, ekzistis kaj oficiala kaj ĉiu-taga antisemitismo en Pollando, foje instigita fare de la kristanaj eklezioj kaj de kelkaj partioj, sed ne rekte de la pola registaro mem.

La pola Konstitucio kaj religio

La pola konstitucio certigas religian liberecon por ĉiuj. La konstitucio ankaŭ donas al naciaj kaj etnaj malplimultoj la rajtojn establi edukajn kaj kulturajn instituciojn kaj instituciojn formigitajn por protekti religian identecon, same kiel por partopreni en la rezolucio de aferoj ligitaj kun iliaj kulturaj identecoj.

Religiaj organizoj povas registri sin. Ĉi tiu registriĝo ne estas necesa, sed ĝi servas la leĝojn garantiantajn la liberecon de religia praktiko.

Slavaj *Rodzimowiercy*-grupoj [=indigena kredo] registritaj ĉe la polaj aŭtoritatoj en 1995 estas la Indiĝena Pola Eklezio (*Rodzimy Kościół Polski*), kiu reprezentas paganan tradicion, kiu iras reen al antaŭ-kristanaj kredoj kaj la Pola Slava Eklezio (*Polski Kościół Słowiański*).

—

En Evangeliaj kajeroj 1, *Biblio*, troviĝas artikolo de Jan Szurman, kiu pritraktas la religian vivon en Pollando. La artikolo estis verkita antaŭ la 72a UK en Pollando.

La Evangeliaj kajeroj troviĝas kaj estas haveblaj ĉe Fontoj.net.

Ĉu Dio vere ekzistas?

Laŭ medito, en aŭgusto 2005 de la Slovena ĉefepiskopo Uran

Tradukis Jacques Tuinder (✠2011)

Imagu al vi dialogantajn ĝemelojn, ankoraŭ antaŭ la naskiĝo, kuŝantaj sub la patrina koro.

Demandas unu el ili:

- “Franjo aŭ fraĵo, ĉu vi kredas je vivo post la naskiĝo?”
- “Kompreneble”, diras la alia. “Devas ja esti almenaŭ io! Eble nia ekzisto ĉi tie estas nur prepara fazo al la vivo post la naskiĝo.”
- “Nenio pli absurda! Absolute ne pensblas vivo post la naskiĝo. Se jes, kia ĝi do aspektus?”
- “Mi ne precize scias, sed mi imagas al mi multe da lumo; kaj ni iros per niaj propraj piedoj kaj manĝos per nia propra buŝo...”
- “Kiel vi pripensas tian sensencaĵon? Iri mem piede kaj manĝi membuŝe? Por povi iri ĉi tie mankas loko, kaj ĉu por manĝi ne sufiĉas la umbilika ŝnuro? Ne, tute ne estos vivo post nia naskiĝo!”
- “La umbilika ŝnuro sendube estas tre mallonga. Sed tio ja ne povas esti la tuta historio! Mi estas konvinkita pri tio, ke post la naskiĝo komenciĝos io

tute nova, io tute alia kion ni simple ankoraŭ ne konas!”

- “Sed ĝis nun ankoraŭ neniu reiris post la naskiĝo. La vivo nepre finiĝos ĉi tie en ĉi tiu mallarĝa, senluma ĉirkaŭaĵo.”
- “Nu, mi eble ne komplete scias, kia aspekto la vivo post nia naskiĝo. Sed ĉiuokaze ni renkontos tie nian patrinon, nian panjon, kaj ŝi zorgos pri ni.”
- “Patrino? Vi parolas pri panjo? Kaj kie estas – viaopinie – ĉi tiu panjo?”
- “Ĉie ĉirkaŭ ni. Sen ŝi ni eĉ ne povus ekzisti! Ŝi portas nin. Ŝi protektas nin. Ŝi nutras nin.”
- “Mi absolute nenion kredas pri tio, kion vi balbutas! Eĉ ne unu vorton! Mi ankoraŭ neniam vidis panjon; ŝi sekve ne ekzistas!”
- “Eble ŝi ne estas videbla, sed jen kaj jen, se ni plene silentas kaj ne movas nin, mi aŭdas ŝian voĉon kiam ŝi kantas, kaj tiam mi sentas ŝian manon karesanta nian mondon. Rigardu, laŭ mi la vivo komenciĝos nur post la naskiĝo!”

✞

Interretaj Diservoj en Esperanto



La 25an de decembro la 14a interreta Diservo en Esperanto (IRDE) estis dissendita. Se vi ankoraŭ ne spektis ĝin, vi trovas ĝin je la retadreso:
<https://tinyurl.com/mvu3mreb>

Antaŭajn diservojn, inkluzive la 14an, vi trovas ĉi-tie:
<https://tinyurl.com/4skbr6bd>

El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

11. februaro

*Mia Patro, donu ke mi havu hodiaŭ
bonan influon je aliaj. Mi ne estu ĝeno por
serĉanta homo, sed ĉiu, kiun Vi metos sur
mian vojon, venu pli proksime al Vi.*



Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso en la kolofono). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.



Listo de personoj, kiuj aliĝis al la 72-a Kristana Kongreso de KELI

Je la fino de januaro

- | | |
|-------------------------------------|--|
| 1. Philippe Cousson – Francio | 23. Oldřich Arnošt Fischer – Ĉeĥio |
| 2. Ágnes Ráczkevy-Eötvös – Hungario | 24. Roman Gmyrek – Pollando |
| 3. Andre Åradsson – Svedio | 25. Helena Biskup – Pollando |
| 4. Bengt Olof Åradsson – Svedio | 26. Krystyna Lesińska – Pollando |
| 5. Pavel Polnický – Ĉeĥio | 27. Anna Mocarska – Pollando |
| 6. Stanisław Dobrowolski – Pollando | 28. Marek Dąbrowski – Pollando |
| 7. Nina Pietuchowska – Pollando | 29. Zdenka Peterková – Ĉeĥio |
| 8. Jarosław Parzyszek – Pollando | 30. Miroslav Peterka – Ĉeĥio |
| 9. Elżbieta Karczewska – Pollando | 31. Helena Klesová – Ĉeĥio |
| 10. Iza Walentynowicz – Pollando | 32. Václav Pospíšil – Ĉeĥio |
| 11. Viviana Isernia – Italio | 33. Helena Burhardt – Pollando |
| 12. Aleksander Zdechlik – Pollando | 34. Emile Malanda Nianga – DR Kongo |
| 13. Jerzy Jurchyński – Pollando | 35. Zofia Śmistek – Pollando |
| 14. Jadwiga Greger – Pollando | 36. Halina Kuropatnicka-Salamon – Pollando |
| 15. Alicja Potrykus – Pollando | 37. Elżbieta Czubaj – Pollando |
| 16. Pavol Petrik – Slovakio | 38. Boris Arrate Veranes – Hungario/Kubo |
| 17. Grzegorz K. Jekel – Germanio | 39. Irena Gowin-Różecka – Pollando |
| 18. Kazimierz Noculak – Pollando | 40. Józef Poraj-Różecki – Pollando |
| 19. Antal Pesti – Hungario | 41. Filomena Di Re – Italio |
| 20. Mirosława Kubicka – Pollando | 42. Raffaele Del Re – Italio |
| 21. Desiree Derksen – Belgio | 43. Ivana Karašová – Ĉeĥio |
| 22. Gabriella Stier – Rumanio | 44. Tadeusz Karaś – Ĉeĥio |

Karaj


Jam multaj aliĝis al la ĉi-jara kongreso, kiu okazigos en aŭgusto en Bjalistoko, Pollando. Se vi ankoraŭ ne aliĝis, vi tuj aliĝu, ĉar post la 1a de aprilo altiĝos la aliĝkotizo.

Pli da informo kaj aliĝilo troviĝas ĉi-tie:

- <https://espero.bialystok.pl/co/keli/?v=9b7d173b068d>
- Dia Regno numero 5/2022

Informoj

Karaj geamikoj, kiuj konis kaj amis Irén Bagi!



Hodiaŭ tagmeze, la 24an de januaro, ni adiaŭis Irén Bagi.

Prediko estis laŭ I. Samuel 3,10

“Samuel diris: Parolu ĉar Via sklavo aŭskultas!”

Ankaŭ Irén estis la persono kiu aŭdis, akceptis kaj faris tion, kion Dio diris al ŝi, komprenis kion ŝi faru kaj kie ŝi agu.

Ŝi vivis longan vivon de honesteco kaj paco.

Ŝi vivis la vivon same kiel la infano Samueleo –
estis preta aŭskulti la vorton de Dio!

Estu la memoro kaj ŝia ekzemplo por ni ĉiuj !

*Kore salutas Vin ĉiujn:
Maria Knaver el Budapeŝto*

Ágnes Ráczkevy-Eötvös (dekstre) gratulas Irén Bagi (maldekstre) pro ŝia 90-jariĝo (aprilo 2022).



En tiu preĝejo en la urna tombejo ŝi atendas la releviĝon. Fotos Maria Knaver.



Ekdormu, Anĝelina

SCHLAF EIN, ANGELINA

1. Ek - dor-mu, Anĝe - li - na, jen lun - he - la bril',
2. Ek - dor-mu, Anĝe - li - na, la patr' es - tas for,

vian ma - non mi te - nas kaj es - tas tran - kvil'.
la te - ro neĝ - blan - ka, frost - sen - tas la kor'.

Lun - bri - lon la nu - boj for - kov - ros nun ĝin,
Tra sa - blo ard - var - ma mar - ŝa - das nun li.

por ke mal - a - mi - koj la do - mon ne tro - vu
Ek - dor - mu, Anĝe - li - na, ĉar ti - on kom - pr - eni

kaj ne vi - du nin.
ne po - vas vi.

3.
Patrin' alilanda kun sia infan',
ŝi ploras, firmitenas ĝin per sia man'.
La patro nin pafas, ĉar devas ja li.
Infan', ili estas de ni malamikoj,
komprenas ne vi?

4.
Kaj por la kanonoj de l' pastroj la ben',
ĉe ili kaj ni pastroj venkpreĝas jen.
La pastroj forsangas en plena solec'.
Ho, mia infan', kial nur estas tia
hororkruelec'?

5.
Vir' skribas al ŝi, «ĝis revid', mia kor'»,
sed pasas la jaro, kaj li restas for.
Kaj ŝi sin ornamas per flor' kaj burĝon'.
Ekdormu, Anĝelina, la floroj forvelkas
je mortokron'.

6.
Kaj trovos vi viron, kaj amos vi lin,
jen ĉie ja homoj, forgesu ne ĝin!
Ja ĉie nur larmoj, samkiel ĉe mi!
Ne diru: «jen sorto», sed ŝanĝu kaj agu
| pli bone ol ni! |

SCHLAF EIN, ANGELINA • M: laŭ Bob Dylan (Farewell Angelina) •
germana T: Ernst Bader • © Copyright control • E: Joachim Giessner